

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

D O K T O R O E S P E R A N T O

La Zamenhof-Jaro proklamita okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo iras sukcese al la kulmina dato, la 15-a de decembro. Estas dezirinde, ke la jubileo estu serioze memorigata en ĉiuj lokaj grupoj. La bedaŭrinda fakto, ke Ĉeĥoslovakio ne estas reprezentita en la Internacia Patrona komitato, inter 130 ŝtatestroj, ministroj, parlamentanoj, sciencistoj, artistoj k.a. eminentuloj, ne estu kaŭzo de hezitado. La publikaĵo "UNESCO-Features" en sia 336-a numero enhavas artikolon angle titolitan "Zamenhof - la patro de Esperanto". Tiu ĉi gazeto estas sendata de UNESCO al miloj da gazetoj en la mondo. Estas registrite, ke en la monda preso aperis nunjare jam multe pli ol 4000 artikoloj kaj informoj pri D-ro Zamenhof kaj lia jubileo. La okazaĵo meritas ankaŭ niajn agojn!

En la patrujo de Zamenhof, en Varsovio, estas ĵus publikigita grava verko de Maria Ziolkowska "Doktoro Esperanto". La pollingva originalo sur la malparaj paĝoj estas sur la paraj akompanata per esperantlingva traduko de Isaj Dratwer. Jen eta fragmento (paĝo 136-140):

"La juna paro tutajn tagojn meditis, ĉu la cenzuro permesos eldoni la lernolibron.

Kiam unu fojon ili eniris en la presejon ĉe la strato Rymarska, kie la libro devis esti presota en t.n. propra eldono, majstro Kelter, posedanto de la presejo, montris al ili la permeson de cenzuristo kaj ekvokis triumfante:

- Al la ago, sinjoro Doktoro Eaperanto, al la ago!

Larmoj ekbrilis en nigraj okuloj de Klara.

Ili revenis hejmen kiel ebriaj. Ŝajnis al ili, ke ĉiujn penadojn ili jam havas post si, kaj antaŭ ili nur solaj venkoj.

Malfruan vesperon Ludoviko ekscitige skribis la versaĵon.

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile
El mia brusto nun ne saltu for.
Jam teni min ne povas mi facile -
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa latorado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe. Trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

- Via verko eliros en la vastan mondon – salutis lin morgaŭe Klara - kaj vi estas

malgaja. Ni ĝoju!

-Mi ne povas - la rediris. Mi staras antaŭ Rubikono. Kiam aperos mia libro, mi jam ne havos la eblon reiri. Mi scias, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, kiu sin okupas "flankaj aferoj". Ja mi netas ĉion sur unu karton, tutan mian estontecon...

Klara trankviligis la fianĉon, kiel ŝi povis. Ŝi certigadis, ke neniam ŝi forlasos lin en la batalo, kaj okaze de la fiasko kaj mizero patro Silbernik ne avaros al ili materialan helpon. Tamen Ludoviko ne reakiris bonan humoron.

Fine alvenis la granda tago de la 14 de julio en la jaro 1887: estis finita presado de la lernolibro.

Ludeviko avide, fojon post fojo foliumis la modestan libreton. Li ne povis ĝissate ĝin legi. Li havis la impreson, ke tio ne estas lia, sed fremda laboro, tiel la presaĵo tre malproksimigis lin de la propra verko.

Klara estis sorĉita de la libro. Ambaŭ kun sinjorino Rozalia ploris pro la feliĉo kaj aŭguris brilan estontecon al Ludoviko. Sinjoro Marko ne plu priridis la filan verkon. Ankaŭ li cedis al seriozeco de la presita vorto. Sed li okupis skeptikan pozicion.

Semajnon post la apero de la libro de Zamenhof en rusa lingvo aperis ĝia pola eldono.

Ĉio okazis en fajro de preparoj por la edziĝfestoj de la juna paro fiksita je la 9 de septembro. Tiuj ĉi preparoj grandskale malorganizis intencitan de la fianĉo kolportadon de la lernolibro kaj ĝian propagandon. Sed tuj post la edziĝo, en nova loĝejo ĉe la strato Przejazd 9, la novedziĝintoj energie okupiĝis pri kolportado. Aktive helpis al ili la deknaŭjara frato de Ludoviko, Felikso, tiam studento de farmacio. Kiam Ludoviko frumatene eliris labori en la hospitalon, Klara kaj Felikso adresadis pakaĵojn kun la broŝuroj kaj dissendadis ilin al redakcioj de gazetoj, konataj personoj, instruistoj, advokatoj, literaturistoj kaj aliaj. Sinjorino Klara kun vera sindediĉo pertraktis kun ĵurnalistoj, lokigis en gazetoj anoncojn pri la lingvo internacia, zorgis pri ilia regula aperigado, transskribis ne tro legeblajn manuskriptojn de prespreparitaj laboroj. Neniam ŝi plendis pri la penadoj. Tiu ĉi sekretariado al la edzo fierigis ŝin. Konvinkita pri lia genio kaj speciala misio, ŝi sentis sin unu el tiuj virinoj, kiujn la mondo nomas vivkamaradinoj de grandaj homoj."

UEA KANDIDATO POR NOBELPREMIO.

OKAZE DE LA 100-JARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE ZAMENHOF, SVEDA PARLAMENTANO, SINJORO EINAR DAHL PROPONIS AL LA NOBEL-KOMITATO, KE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO RICEVU LA PACPREMION.

Ju pli da personoj scias Esperanton, des pli granda estas ĝia valoro por ĉiu. Lerne la internacian Lingvon!

Eĉ la plej altaj intelektaj elitoj sentas sin barbaroj en fremdaj lingvaj medioj. Helpu al forigo de la lingvaj baroj: Lerne Esperanton!

VIZITIS NIN SAIMIDEANO GEORGES GRINIATSOS.

Tra nia lando vojaĝis greka samideano Georges Griniatsos, unu el defendintoj en la konata proceso kontraŭ Manolis Glezos. Dumvojaĝe li jam vizitis Jugoslavion, Hungarion kaj el Ĉeĥoslovakio li veturas en Pollandon.

Pri la proceso kaj pri la maljustaj kondamnoj de la grekaj patriotoj li prelegis en nia lando entute 20-foje. Plej vizitita parolado estis en jura fakultato de Karol-Universitato en Praha, krome li tie prelegis en 1a radio kaj en Esperantista Klubo, pri kio raportis ankaŭ la ĵurnalo "Večerní Praha". Pluaj paroladoj okazis en Karlovy Vary, Plzeň, Ústí n/L. kaj Hradec Králové.

Plej brilan sukceson akiris nia gasto en Ostrava. Ĉi tie dum 3 tagoj li faris 8 paroladojn kaj krom unu estis ĉiuj esperantlingvaj. Interpretis ilin Dr. kaj Vl. Kočvara. Krom en KV KSČ, KNV ktp. okazis unu parolado en la televido Ostrava (elsendata la 18-an de nov.).

Nia kara gasto en ĉiuj paroladoj nealtrudeme menciis Esperanton. Tio kun la brilaj tradukoj pruvis al multaj aŭskultantoj uzeblecon de nia lingvo. Nia redaktoro ankaŭ vizitis s-ron G. Griniatsos en la hotelo Ostrava por mallonga intervjuo:

Kia estas celo de via vojaĝo?

Mi vojaĝas kiel esperantisto kaj juristo. Mi vizitas samideanojn kaj miajn kolegojn. Ĉar ĉiuj, eksciante, ke mi defendis en la proceso kontraŭ M. Glezos, montras grandan intereson pri ĝi, mi havas okazon paroli pri la proceso kiel juristo.

Ĉu la tutmonda protestmovado helpis al la akuzatoj en la proceso?

Protestis la tuta honesta mondo, homoj kun la plej diversaj opinioj – sciencistoj, artistoj, politikistoj, religiaj funkciuloj, homoj direktitaj maldekstre, neŭtralaj, eĉ dekstraj. La argumentado je juĝistoj, ke temas nur pri komunista propagando, ne estas prava, ĉar protestis eĉ homoj, kiuj havas nenion komunan kun la komunismo, kiel ekz. J. P. Sartre, Ollenhauer, Gaittskell ktp. La kampanjo helpis en la proceso, ĉar punoj ne estis tiom severaj kiel antaŭe, kiam estis uzita la sama leĝo en la samaj kondiĉoj.

Kion vi dirus pri M. Glezos al legantoj de Fajrero?

Manolis Glezos, ankoraŭ kiel juna studento, deŝiris de sur Akropolis faŝistan flagon. Tiu ĉi heroa akto estis signalo al la rezistenc-movado en Grekujo kaj ankaŭ en la tuta Eŭropo. La greka popolo tiun ĉi akton tre estimas.

Ĉu Esperanto helpas al vi dum la vojaĝo?

Jes, samideanoj donas al mi plej grandan kaj plej altan helpon en ĉiuj landoj, kiujn mi vizitis, t.e. Jugoslavio, Hungario, Ĉeĥoslovakio. Ili estis tre gastamaj kaj helpis al mi multfoje. Mi konsideras min deva korege danki ilin.

Kia estas nun la stato de Esperanto-movado en Grekujo?

Nun la Esperanto-movado ege kreskas, fariĝas pli kaj pli forta.

Via plej forta impreso el Ĉeĥoslovakio?

Grandega industria progreso post la dua mond-milito. Tio estas rezulto de la naciigo de industrio kaj de la kvin jaraj planoj. En viaj landoj ne ekzistas senlaboruloj kaj periodikaj ekonomiaj krizoj.

Intervjuis V. V.

Atentu!

ABONKONKURSO por 1960

ĈU VI DEZIRAS ALTIGI LA KVALITON DE "FAJRERO"?

Varbu novajn abonantojn!

PARTOPRENU EN NIA ABONKONKURSO POR 1960!

POR 20 PLEJ SUKCESAJ VARBONTOJ NI PREPARAS VALORAJN PREMIOJN!

Detaloj sekvos en la 6-a numero.

El notkajero de Verda Vaganto

Mi volonte plenumas peton de la redakcio kaj disponigas al ĝi mian notkajeron. Ne, mia notkajero ne estas kroniko, sed kolekto de interesaĵoj, kiujn mi renkontis dum miaj vagadoj.

Oh - permesu, ke mi prezentu min: Verda Vaganto, Esperantujo. Mia profesio - vaganto, mia nacieco - verda. Sed... tamen vi ja konas min. Ĉu ne? Jes, vere, mi jam vizitis vian lokon, parolis kun vi kaj notis viajn plendojn kaj viajn sugestojn, sukcesojn. Nu, kaj ĉi faktojn mi elmetas al la publiko - ne koleru je mi pro tio.

Ekzemple, antaŭ nelonge mi vizitis Ostrava okaze de Interbabilado 1959. Ĝi tre kontentigis min.

Jam unua parolado min agrable surprizis. La elokventeco de D. Kočvara, kiu parolis pri la 44-a kaj pri Varsovio, kaŭzis, ke mi aŭskulti senspire. Ni vidis ankaŭ interesajn bildojn pri Varsovio, la kongreejo kaj kongresaj renkontiĝoj. Kiel aldonon ni denove vidis la ĉarman filmeton pri SET, reĝisoritan de J. Solnický. Ĉiuj 53 ĉeestintoj antaŭĝojis je plua programo de la Interbabilado.

La dua tago, 25.X., estis tre programriĉa kaj varia. Tuj matene, kiel kutime kun ioma malfruigo, komenciĝis la ĉefa parolado de Ing. J. Werner: Esperanto, esperantismo, esperantistoj. Ho ve, la parolanto vortkanonis en niajn vicojn per plej pezaj kalibroj. Eĉ mi kelkfoje ekkonis min en kritikaj vortoj. Kiel refreŝiga bano efikis posta parolado de Dr. Kočvara: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, kaj ĝia nuna tasko. Dum el la unua parolado ŝajnis, ke ni, esperantistoj, estas strangaj homoj, el la vortoj pri ĈEK ni vidis, ke tamen estas en la movado multaj seriozaj agemuloj. Bona kaj interesa diskuto sekvis post la paroladoj. Kompreneble, ke ĉiuj 38 ĉeestintoj ne parolis, sed tamen la diskuto estis vigla.

Post komuna tagmanĝo okazis kutima ekskurso, ĉi-foje en "Nová Huť de K.Gottwald" en Kunčice. Ĝi al ni tre plaĉis, ne ĉiu el ni jam estis en tiel grandioza fabriko. Ni vidis koaks-bateriojn, tub-lamenejon. Multaj interesiĝis pri Manesmana metodo de tublamenigo, aliaj admiris la plej grandan prem-maŝinon en la meza Eŭropo (en pez-forĝejo). Nepre ni ĝojegis pro la ekskurso, kvankas ĝi estis iom fortostreĉa.

Vespere ni apenaŭ sufiĉis manĝeti kaj jam ni devis veturi al Ostrava-Michálkovice, kie okazis la amuza vespero. Fakte amuza. En unu angulo de salonego

estis konstruita efektiva tendo, antaŭ ĝi tendarfajro, arbaro el teatraj kulisoj kaj benketo por geamantoj; ĉio dronis en vespera krepusko. Por momento ni ĉiuj revenis en belegajn momentojn en tendaro. Ni komencis revii... kaj tuj ni vidis humuran bildkaj vers-rakonton pri ĉi jaraj SET-oj, per kio komenciĝis la programo. La atmosferon de entendara vespero substrekis havaj-gitara ludo de s-ano Piotrovski. Tuj poste sekvis la ĉefa programo:

Leviĝis la kurteno - kaj sur la sceneja fono estis "erinaco"- pikema kaj defia. Ankaŭ sur la scenejo prezentiĝis Erinaco - pikema kaj kritikema. Brrr, terura bestaĉo. Ĝi apenaŭ komencis, kaj ni tuj vidis, kion celas ĝia prezentado... Nu EDZINO-FINON. 103 rigardantoj estis entuziasmigitaj, eĉ la geedzoj. Domaĝe, ke tiun teatraĵeton ne vidis ĉiuj esperantistaj paroj; eble la esperantistaro estus tuj duoble pli nombra. La ludo estis brila, tamen la recenzan kritikon prefere mi transdonus al fakuloj. Post la ludo ni dancis, babilis, amuzs ĝis noktomezo, eĉ pli.

Lunde matene je la 8-a kunveno ne komenciĝis, nur je la 9-a estis jam sufiĉa vizito, do VI. Kočvara per mallongeta parolado malfermis diskuton pri la instruado en SET. Bedaŭrinde la diskuto estis malforta malgraŭ multaj solvendaj problemoj, verŝajne pro dormemo de 36 ĉeestantoj. Je la 10,30 okazis la dua fakkunveno, gvidata de J. Werner "Signifo de preso por nia laboro". La sekvanta diskuto estis jam pli vigla.

En fluo de la unua fakkunsido estis elektita la prepargrupo de SET-1960, kiu tuj ekkunvenis aparte.

Sed... ĉio havas sian finon. Ankoraŭ ne alvenis la tagmezo kaj alveturintoj fariĝis forveturantoj. Ĉiuj forlasas Ostravon, multege dankante al ostravanoj por fakte modela, alloga kaj interesa programo. Ĉiuj adiaŭas kun espero, ke post unu jaro ĉiuj denove revidos sin en tiu ĉi industria koro de Ĉeĥoslovakio.

Ankaŭ mi adiaŭis kun miaj karaj gastigantoj kaj dankis al ĉiuj por ilia oferema laboro.

Ĝis la... karaj ostravanoj!

Via Verda V a g a n t o

ESPERANTISTO, EKESTO KAJ MALAPERO

teatraĵo kun kantoj en ok bildoj, kun prologo kaj epilogo, estas verko de du junaj esperantistoj en Praha, Zdeněk Čapek kaj Radim Kudla. Ĝi ne estas tutvespera dramo, sed sprite verkita komedieto, kiu en daŭro de unu horo prezentas diagnozon de unu grava malsano de nia junulara movado. La teatraĵo per la ĉefa persono de juna dando Hezoun turnas nian atenton al homoj, kiuj en nia movado aperas, fulm-rapide gajnas famon, kaj subite malaperas. Moto de la tuta teatraĵo estas samnoma versaĵo de Raymond Schwartz. Same kiel la komentaj versoj ankaŭ la muziko de Radim Kudla ligas unuopajn bildojn kaj agrable kolorigas la scenejan okazadon. Sed ni revenu al la unua prezentado en Ostrava:

"...Ni aktoroj finas nian prezentadon kun la konvinko, ke en plua akto ludos vi mem. Do, ĝis la revido en iu akto de nia komuna ĉiutaga vivodramo!"

La aktorojn en spontanea aplaŭdo persekutas embaraso. Bovojanský saltas en la publikon kaj sur la scenejon alkondukas unun el la aŭtoroj, junan inĝenieron Zdeněk Čapek el Praha. Homoj sur la scenejo estas surprizitaj per la sukceso, ĉar...

Intermete:

Unu sinjorino al mi flustris: "Kiam mi vidis la posttagmezan ekzercon, mi signis min per sankta kruco. Sed nun vespere ĝi estis io tute alia."

La kurteno falas kaj mi intervjuas nian gaston, la aŭtoron Zdeněk Čapek.

KIAN IMPRESON POSTLISIS EN VI NIA INTERBABILADO KAJ SPECIALE LA TEATRAĴO?

Mi ne bedaŭras, ke mi venis je via Interbabilado (unuafoje!). Plaĉis al mi bona organizo kaj, estas domaĝe, ke ne alveturis al Ostrava pli da homoj. Koncerne la teatran prezenton mi devas konfesi, ke mia entuta impreson estas bona. Kaj ne nur la mia, sed de plejparto de la spektantoj. Vi faris grandan laboron.

KIEL VI TAKSAS LA REĜION KAJ ARANĜON ?

La reĝio dum la tuta prezento havis sian celon, al kiu ĉion direktis, ne forgesis eluzi la tekston kaj la situaciojn por subita kaj akra erinaca piko. La reĝisoro (Vl. Kočvara) komprenis la ĉefan ideon de la afero. Ĉio bone kaj rapide fluis. Iam eĉ utilis eta paŭzo kaj vicigo de je unu grado malpli alta rapideco, por ke la aktoroj povu scenon plene elludi, ekz. Hezoun (Dieter Berndt) kun Hispanino (Lída Čermáková) en la 6-a bildo. La kunlaboro kaj kontakto kun la muziko estis bona (pianludis Věra Haltofová), krom tiu malfeliĉa fermo, sed tiu la rezulton jam neniel ŝanĝis. La muziko estis bonega kaj precipe konvene akcentis scenojn kaj helpis transiri la surdajn lokojn. Ĝia funkcio do estis vere prava kaj taŭga. La scenejo precize respondis al miaj imagoj, do al la afero mem. Ĝi estis moderna.

KIUJN PERSONOJN VI PLEJ ALTE TAKSAS?

El la viraj roloj estis plej bona tiu, kiun prezentis Dr. Kočvara. Precipe kiel Piperkov. Entute la 3-a bildo aspektis plej unuece. Alveno de Piperkov en restoracion, impresige kolorigita per la Muziko, estis por mi belega travivaĵo.

El la virinaj personoj estis por mi surprizo Alena Zdražilová. Mi imagis ŝian rolon kiel "naivan knabinon", kaj nun imagu al vi, ke tion elrevitan vi vidas multe pli bela, ankoraŭ pli poezia.

La bildoj 6-a kaj 7-a estis ĉiufanke tre malfacilaj kaj escepte de la fermo havis promesan nivelon. La 7-a estis prezentita pli unuece ol la 6-a. La baletisto Marie Šimíková (poŝtisto) portis profesion rutinon kaj estis funkcie ĝusta.

Bovojanský danke al Vlasta Kočvara fariĝis la plej aktiva kaj samtempe plej groteska elemento.

Iom mi laboris en "Verda Ĉaro". Ili ĉion konsciencie pristudegas. Ĉiu devas la tekston regi suverene. La ekzercojn oni vizitas eĉ se estus tertremo. - Via rezulto estas bona, sed dank' al tio, ke parta improvizo respondis al karaktero de la ludo, kaj dank' al via entuziasmo. Se vi volas iri antaŭen, pripensu tion!

FINE ONI KUTIME DEMANDAS PRI LA PLANOJ.

Ni reciproke konatiĝis: Ostrava trupo kaj du pragaj "izoluloj". La situacio aspektas tiel, ke ni novas la komencitan kunlaboron daŭrigi. Mi promesas, ke antaŭ fino de la jaro 1959 plus unu tago venos al Erinaco per rekomencita poŝto paketo kun. . . (dume redakcia sekreto!)

Dankon, kara Zdeněk, kaj ne forgesu je via amika, kabareta bando en Ostrava.

red. Juez.

SET 1960

Spertoj atingitaj en la lastaj jaroj devigas nin organizi la tendaron en unu loko po ne pli ol 50 lernantoj en 2-3 etapoj. Tiel ni povos koncentrigi la plej bonajn gvidantojn kaj instruistojn. La tendaro devas fariĝi eduka instituto por junularaj funkciuloj. Nunjare montriĝis, ke 20% da lokoj en SET restis neokukpitaj. Ni devas klopodi pri tute mala fenomeno, por ke ni povu elekti nur fakte agemajn homojn, kiuj volos la gajnitajn spertojn uzi por la movado. Starigante tian kondiĉon ni vidas, ke estos utila unu tendaro modele gvidata ol tri tendaroj, kie la instruprogramo kaj la gvidado havus mankojn. Pliboniĝi devas ankaŭ la aliĝa disciplino. Unusemajna restado estonte ne estos ebla. Krome ni deziras, ke la kursanoj estu el kiel eble plej multaj lokoj de ĈSR. Plej konvenan lokon por la tendaro ni konsideras en Lančov.

Preparlaboroj devas komenciĝi tuj. La kunlaboron jam akceptis:

Karel Franc (Pardubice) - instru-aferoj,

Magda Matušková (Opava, tř. Spojenců 18)- sekret.

Drahomír Kočvara (Ostrava) - propagand-aferoj,

Radek Wolkovinský (Ostrava)- program-aferoj,

Pavel Sittauer (Třebíč) - teknika preparo.

Ni vokas al ĉiuj spertuloj, kiuj komprenas gravecon de nia intenco, ke ili aliĝu al la kunlaboro. Nur bona preparo donos al ni bonajn rezultojn.

Dr. Kočvara

Nia spegulo

ESPERANTO INTER PIONIROJ. La Regiona Domo de Pioniroj en Ostrava postulis de Esperanto-Fako ĉe ZK VŽKG gvidanton por Esperanto-rondeto. Marde 10.XI.1959 estis kunvokita la unua horeto, kiun vizitis 12 pioniroj. La rondeton gvidas s-anino Lída Čermáková. Laŭ nia informiĝo fondon de la rondeto iniciatis infanoj mem. Certe ĝi estas rezulto de nia instruado de Esperanto en lernejoj.

Ankaŭ en Třinec oktobre komenciĝis E-kurso en la Pionira Domo. Vizitas ĝin gelernantoj el ĉiuj ĉehaj kaj polaj lernejoj en Třinec.

SKOTA DOCENTO PRI GEOGRAFIO EN OSTRAVA. Antaŭ unu monato vizitis nin skota samideano, universitata docento el Edinburgo, Richard Osborne, kiu dumvoje al Pollando restis 3 tagojn en Ostrava. Tie li interesiĝis pri konstruado de satelit-urboj. Tiucele li vizitis Poruba kaj Stalingrad; akompanis lin s.V.Slaný.

E-EKSPOZICIO EN JIHLAVA. Esperantistoj en Jihlava dum oktobro 1959 aranĝis Esperantan ekspozicion, kies gvida ideo estis esprimita en la devizo: "Esperanto celas mondpacan kunvivadon". Ĝia kulmina punkto estis elmontro de la materialo ricevita de LKK en Varsovio. Pri artisma aranĝo zorgis juna arkitekto Ing. Jan Kalný. Pri granda propaganda sukceso atestas 4550 subskriboj! (Jihlava havas 35 mil loĝ.)

ĈEĤA LITERATURO EKSTERLANDE. "Kiso de la reĝino", rakonto de Fr. Kubka estis publikigita en la israela ĵurnalo "Al Hamismar". En la hebrean lingvon

tradukis ĝin Itamar Even-Zohar laŭ Esperanto-teksto de Ota Ginz.-

"MLÁDÍ" (Juneco), grupa gazeto de ČSM en VITANA Byšice (n-ro 16, 23.X.59) informas pri Esperanto-kurso, kiu sekvas vastan intereson pri la Lingvo Internacia vekitan per allogaj geografiaj murgazetoj kun materialo prizorgita helpe de Esperanto. La kurson gvidas s-ano Zd. Křimský (Byšice 294).

"HLAS BANKY" (Voĉo de banko) - faka gazeto de la Ŝtata Banko Ĉeĥoslovaka (n-ro 19, 10.X.)- alportas la artikolon de F. Sviták, Praha: "Per Esperanto por la mondpaco". La dukolona artikolo estas titolita en Esperanto kaj akompanata per fotografiaĵo el la kongresa salono de la 44-a U.K. Ĝi informas pri la plej gravaj okazaĵoj dum la kongreso kaj pri impresoj.

ILUSTROWANY KURJER POLSKI publikigis en sia 193-a n-ro intervjuon kun s-anino Eva Seemannová el Praha. La redaktoro Kazimierz Małycha interalie demandis - kiamaniere la praga Esperanta teatra kolektivo "Verda Ĉaro de Julio Baghy" ricevis la nomon, kiel ĝi fondiĝis, evoluis ktp. Li laŭde akcentis la prezenton de "Pigmaliono" kaj deziris al la kolektivo multe da sukcesoj en plua artisna agado.

LA AŬTUNAJ KURSOJ DE ESPERANTO ekfunkciis diversloke. El la kolektiĝintaj raportoj ni mencias: TŘINEC - A kaj B kursoj ekde septembro, instruas s-anino Milatová.

OSTRAVA-VÍTKOVICE (VŽKG) - du kursoj A kaj unu B. Instruas A. Zdražilová, Vl. Slaný kaj J. Werner

OSTRAVA-TRAMISTOJ - A-kurson por 20 part.gvidas s-anoj Vl. Slaný kaj M. Maštalář.

OSTRAVA-BLINDULOJ. S-ano A. Fiala gvidas telefonan kurson por 19 personoj.

MÍSTEK. En la dekunujara lernejo instruas Prof. Lad.Buzek 12 gelernantojn en E-interes-rondeto.

ODRY. La kurso komenciĝis en la Uzina Klubo de Optimit la 29-an de okt.

PÍSEK. En la elementa kurso estas 24 personoj. Progresintoj perfektiĝas en konversacio, gramatiko, literaturo kaj tradukado.

TŘEBÍČ. La kursoj B kaj C laboras ekde septembro, kurso A estis malfermita meze de oktobro. Instruas Prof. T. Kilian, B. Daňhelová kaj Zd. Rejlová.

LA MOVADO EKSTERLANDE

Omaĝe al D-ro ZAMENHOF okaze de la jubileo.

En Roza Valo, Bulgario, estas konstruata hospitalo, kiu portos la nomon de D-ro L.L. Zamenhof iniciate de E-konferenco en la vilaĝo Rozino.

En Varna, Bulgario, estas konstruota monumento al D-ro Zamenhof.

Okaze de Zamenhofa jubileo Bulgara Poŝto aperigos poŝtmarkon, kiu jam estas presata.

OSLO (14,9.53). En la norvega ĉefurbo, en aŭlo de la universitato, festis la 100-jaran datrevenon 600 ĉeestantoj, inter ili la urbestro kaj aliaj eminentuloj.

ĜOJIGA INFORMO EL SOVETUNIO: Ni en Sovetio ekiras novan eraon kaj faros grandan paŝon. De nun Esperanto estos instruata en kluboj kaj lernejoj, por preso estas jam preparitaj la Esperanta-rusa Vortaro de Prof. Bokarev kaj lernolibroj.

La 13-15 de decembro en Leningrado, en Doma de Sciencistoj, okazos jubilea sesio kun raportoj: Esperanto en la lumo de dialektika materialismo.

LA GRUPON "FAJRERO" EN MOSKVO somere vizitis Blanka Daňhelová el Třebíč. El sia letero ni ĉerpas kelkajn notojn:

La grupo Fajrero kunvenas ĉiusemajne en ĉeĥa restoracio Plzeň en la Parko de Kulturo kaj Ripozo de M. Gorkij. Programon formas t.n. "Vivanta gazeto". La paĝoj de la gazeto estas jenaj: La paĝo de E-historio, paĝo de novaĵoj el la mondo kaj el Sovetio, paĝo "deziras korespondi", lingva paĝo k.a. Ankaŭ tie aktivas drama kaj literatura kolektivoj. La kunvenojn ofte partoprenas ankaŭ alilandaj kaj aliurbaj esperantistoj... Ankaŭ el la letero: En Sovetio estas 30.000 aktivaj esperantistoj kaj ilia nombro rapide kreskas.

ESPERANTAJ DISAŬDIGOJ DE POLA RADIO.

Pola Radio elsendas ĉiutage de la 16,30 ĝis 17,00 h. per ondolongoj: 25,39 — 30,69 — 31,45 — 31,50 — 41,01 — 42,11 — 50,42 — 249 m.

La skemo de la elsendoj: Krom tagaj novaĵoj el Pollando kaj el la mondo oni elsendas:

LUNDE: felietono, ĉiun duan lundon: scienca tribuno

MARDE: pola muziko

MERKREDE: koncerto kun bondeziroj

ĴAŬDE: komentario pri aktualaj temoj, leterkesto

VENDREDE: literatura kroniko

SABATE: sonrevuo "La semajno en Pollando"

DIMANĈE: esperentista magazino "Sub la verda stelo".

Aŭskultu la belajn programojn! Skribu ĉiuj al: Pola Radio, E-disaŭdigoj, Warszawa - pri viaj deziroj kaj impresoj. Se tiel evidentiĝos granda intereso, ekde nova jaro oni eble disaŭdigos en Esperanto dufoje en la tago.

Lige kun la 100-jaro de la unua pola poŝtm., Pola Radio anoncas filatelan konkurson. Lotumitaj estos multaj valoraj premioj. Limdato: 25.1.1960. Postulu la kondiĉojn en Esperanto tuj je la menciita adreso!

TRADUKOJ DE ESPERANTAJ ORIGINALOJ. En Pollando estas anoncita la publikigo de pluraj originale verkitaj libroj en Esperanto, inter kiuj "RETORIKO" de Prof.I.Lapenna, "TRA LA BRAZILAJ PRAARBAROJ" de Tibor Sekelj, "LA VIVO DE LA PLANTOJ" de D-ro P.Neergaard kaj "MISTERO MINORA" de D-ro F.Szilagyi. (En pollingva traduko.)

EN VARSOVIA OPEREJO komenciĝis E-kurso jam antaŭ du monatoj. Partoprenas ĝin la plej eminentaj gekantistoj, instruas Andreo Pettyn. Oni intencas surscenigi operon en Esperanto kaj prezenti ĝin dum la 45-a en Bruselo. -

La 9-an de nov. okazis en Varsovio granda Esp. koncerto, kiun partoprenis interalie la basulo Eduardo Pawlak, tenorulo Jerzy Granowski kaj sopranulino R. Kinasz. Ĉiuj estas kantistoj de la Varsovia Operejo. La koncerto estis organizita de la Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio. La kolektita mono estas destinita por la ZAMEHOFAJ SOLENAĴOJ, kiuj okazos en Varsovio okaze de la 100-jara datreveno en decembro.

REGISTAROJ SUBTENAS ESPERANTO-MOVADOJ.

La brazila registaro asignis al esperantista kooperativo en Rio de Janeiro 250.000 kruizerojn por disvastigado kaj instruado de Esperanto.

En Hungario la ministerio de klerigaj aferoj per ŝtata subvencio certigis la financon bazon por laboro sur la kampo de la Internacia Lingvo.

En lasta tempo ankaŭ la islanda kaj pola registaroj finance subtenis la agadon de esperantistoj.

E-RONDETOJ EN HUNGARIO. Diference de niaj "interes-rondetoj" ekzistas en Hungario "Fakrondoj", da kiuj funkciis en 1958-a jaro 123. El tiu nombro estis 47 fakrondoj por junularo. La rondoj funkcias en domo de kulturo kaj en laborejoj.

GRANGIOZA KOMERCISTA-FERVOJISTA VORTARO HUNGARA-ESPERANTA. La mezlerneja eksprofesoro, hungaro Karlo ENDRE, post 12-jara laboro finas nun verkon dupartan: "Redakta vortaro" kaj la Varnomaro. La verko konsistas el 60.000 slipoj – 1800 dense maŝinskribitaj paĝoj de kontor-papero. La verko povas esti konsiderata kiel la dua kaj la tria partoj de estonta fervojista fakvortaro. La unua parto estos la Fakterminaro kiun nun redaktas la Terminara Komitato de IFEF (La Internacia Federacio Esperantista Fervojista). - La 75-jara s-ano K. Endre meritas gravan rekonon kaj nian admiron kaj dankon.

MARJORIE BOULTON ĈE HUNGARA MINISTRO. Printempa 1959 estis vizito en Hungario la mondkonata angla verkistino esperantista, M. Boulton. Pri unu el pluraj renkontiĝoj ŝi diras:

"Akceptis min tre afable s-ro Stefano Kossa, ministro de trafiko kaj poŝto. Kiu interpretis? Nu, sinjoroj Baghy, Márton kaj D-ro Báckai ĉeestis, sed interpreton mi tute ne bezonis: s-ro Kossa tuj alparolis min en perfekta Esperanto, kaj ni povis tute senpere kaj nature konversacii. S-ro Kossa troviĝas en la Internacia Patrona Komitato, respondecis pri la du Esperantaj poŝtmarkoj, per kiuj Hungarujo antaŭ nelonge ĝojigis nin kaj laŭ ĉies diro, estas tre amata inter la hungaraj esperantistoj, ĉar ĉiam lojalis al Esperanto; kaj multfoje en tiu suferinta lando, tia lojaleco postulis la kuraĝon de vera viro. La Ministro eĉ donacis al mi subskribitan libron sian. -

OFICIALA ORGANO DE LA KOMUNISTA PARTIO de Ukraino, "La Laborista Gazeto" en Kijev, publikigas laŭ deziro de siaj legantoj Esperanto-kurson en la rusa kaj ukraina lingvoj.

JAPANA FILMO UZIS ESPERANTON. La japan film-societa DAIEA pretigis nun filmon "La sturmo de Johano Arima", La reĝisoro Daisuke Itou laŭ propono de s-ro Nobuo Miura, estro de Kioto-Studio, uzis por certa reĝolando en Eŭropo komence de la 17-a jarcento kaŝnomon Iberio kaj Esperanton kiel iberian lingvon. En 114-minuta daŭro de la filmo oni ne malofte aŭdas paroli aŭ komandi en la "iberia lingvo".

GRANDIOZA 30-a ITALA E-KONGRESO en Florenco, en Palazzo Vecchio, (19-24.IX) okazis sub la Alta Patronato de la ŝtata prezidanto Giovanni Gronchi. Prezidanto de la honora komitato estis la ĉefministro Ant. Segni, membro de la Int. Patrona Komitato. En la komitato estis plue 7 ministroj, prez. de la Senato k.a. Preskaŭ 500 part. el 19 landoj, 115 eksterlandanoj.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ. Centro de Esploro kaj Dokumentado bezonas plenan kaj fidindan statistikon pri A) geinstruistoj, kiuj estas es-pistoj, kaj B) lernejoj, en kiuj estas instruata Esperanto. La enketaj informoj estas en "ESPERANTO", organo de UEA, n-roj 4 kaj 7-8. Instruistoj, por kiuj la gazeto ne estas atingebla, postulu tuj la informojn en la red. de Fajrero por ke vi povu raporti al CED antaŭ 1.1.1960! Nepre ne preterlasu la alvokon!

Jaroslav S E I F E R T:

A ŭ t u n o

Fridas jam ĉio en malseka vento,
tere ariĝas foliar'.

Diru, hirund', al kiu firmamento
celas nun via flug-prepar'?

Paĉjo flugigas al infanoj drakon,
la drak' barakte levas sin.
Adiaŭ, ho somer'! Jam korvan grakon
ni aŭdas klare en proksim'.

Knaboj sidadas ĉirkaŭ fajretoj,
varmas en poŝ' el cindra bak' terpom'.
Filandrojn molajn vi kun oft-ripetoj
viŝas de frunt' aŭ de menton'.

Ne plendu do, printempo ja revenos
kaj freŝa limfo kun printemp'.
Griza nebulo teron ĉirkaŭprenos
dormige por mallonga temp'.

El la ĉeĥa trad. Tomáš Pumpr

LEKANTETO

Porinfana paĝo de Fajrero

Por LEKANTETO sendis la onklo Paŭlo el Budapeŝto"

S U R V O J E A L L A T E N D A R O

Tragikomedio el la vivo de hungaraj pioniroj. Loko: Stacidomo de malgranda provinca urbo. Ludantoj: Gvidantino kaj pioniroj.

Gvidantino: Rapidu kaj stariĝu en la vico post mi. La vagonaro jam venas kaj haltos ĉi tie nur por nelonge.

Peĉjo: Sed ni neprenis la pioniran ŝranketon!

Gvid.: Por kio vi bezonas la ŝranketon? En ĝi estas nur libroj. Kelkajn ni kunportas, ili sufiĉas dum la tendaro.

Peĉjo: Sed ni bezonas la ŝranketon!

Gvid.: Ne ĝenu, silentu nun. Ne estas tempo pri tio paroli. (Fajfsignalo) Jen la trajno!

Peĉjo, poste ni parolos pri la afero. Rapide envagoniĝu!

(Ĉiuj rapide envagoniĝas. En la vagono:)

Gvid.: Ĉu havas ĉiu sidlokon? Ĉu ne mankas io? Bone! Nun diru, Peĉjo, kial vi tiom deziregas la ŝranketon?

Peĉjo: Ĉar en ĝi restis niaj fervojbiletoj!-

E N L I N G V A L E C I O N O

Instruisto diras al lernantoj simplajn frazojn kaj ili devas traduki ilin.

Instruisto: Ili ne ekzistas. Nu, Petro, traduku!

Post bona respondo la instruisto turnas sin al alia knabo:

Instruisto: Vi ne estas! - Karlo!

Karlo: (krias indignite) Sed, sinjoro instruisto, mi estas Karlo!

LA KONKURSO DE FAJRERO 1959

La lingvan kaj literaturan konkurson de la jaro 1959 ni finas per la prezento de la plej sukcesaj partoprenintoj kaj gajnintoj de libro-premioj. La konkurso celis la reciprokan proksimiĝon inter Fajrero kaj la legantaro kaj kompreneble ankaŭ la lingvan perfektigon. La celo estis plenumita nur parte pro la negranda intereso aŭ malkuraĝo el flanko de la legantoj. Ni kredas, ke la konkurso en la venonta jaro elkreskos pli alte kaj metos kondiĉojn por partopreno amasa. Ĝi estos ne nur konkurso de unuopuloj, sed ankaŭ inter grupoj. Ankaŭ la sugestoj en la respondoj pri la 6-a tasko estos konsiderataj.

Venkintoj kaj la premioj:

1. Jiří PATERA (Most)- 47,2 p. en 6 taskoj. M. Ziołkowska: "Doktoro Esperanto".
 2. Vladimír NOVOTNÝ (Praha) - 39,7 p. en 6 task. M. Ziołkowska: "Doktoro Esperanto".
 3. František Maděryč (Havířov)- 39,0 p.-6 task. "Postmarkoj de la Gina Popola Respubliko".
 4. Zdena Rejlová (Třebíč) - 37,0 p. en 6 task. "Pollando - geografio, historio, kulturo".
 5. Marie Valešová (Liberec) - 34,2 p. en 4 task.
- "Por nova afero nova maniero"- 12 ĉinaj noveloj de nuntempaj verkistoj.

Al la venkintoj ni sincere gratulas kaj deziras favoran venton en la konkurso 1960.

Red.

MODELAJ TRADUKIJ. I-a kategorio, 2-a tasko:

Dolina ne estis memstara vilaĝo; ĝi apartenis al Zálesí. Ĉi tie ja estis finfine nur dudeko da vilaĝdomoj kaj du pli grandaj bienoj, kompreneble krom kvindeko da vilaoj kaj vilaetoj, sed tiuj servis plejparte nur dum ferioj. Malgranda teretaĝa unuklasa lernejo lumis flave apud la ĉefsoseo, tuj kontraŭ la digo de la fiŝlago Šíp, ĝuste tie, kie estis komenciĝanta leviĝado al Zálesí per vojkurbiĝo al la arbarista

domo de Los. Vojpecon post la vilaĝo, en la valetio de Ĉeperka, sub la fiŝlago Kuňák, staris ankoraŭ soleca muelejo kaj restaĵoj de malnova brikfarejo, kiu jam antaŭ longe ĝisvivis.

RIM.: En kelkaj kazoj estas uzeblaj ankaŭ aliaj similaj sencoj aŭ sinonimaj esprimoj, kiel ekzemple: dudeko da - ĉirkaŭ dudek, digo - baraĵo, soleca - forlasita, ĝisvivis - finservis.

Kategorio I, tasko 4-a:

1. En nia lernejo komenciĝas la kurso de Esperanto (Esperanto-kurso). 2. La patro estis ĝuste bonveniganta sian malnovan amikon. 3. Knabo haltis kaj observis nin. 4. Ŝia robo tre diferencis (dis)de tiu ĉi. 5. Akvo ŝprucis tre alte(n).

Kategorio I, tasko 5-a:

1. Mi ekvidis belegan regionon (pejzaĝon). 2. Mi havas mian opinion. 3. La entrepreno de regiona skalo. 4. Mi iras trans riveron. 5. Vi tradukis tion bone.

Kategorio II, tasko 1-a:

1. Estas memkompreneble, ke la venontan jaron mi denove partoprenos tendaron. 2. Venis nek Jiří, nek Karel, sed tamen ni venkis. 3. Mi atendas ĉi tie eble kvin tagojn ĝis ĉesos pluvi. 4. Mi instruis al ŝi belan ĉeĥan kanton. 5. Mi bezonas ian malnovetan fotoaparaton de germana marko.

Kategorio II, tasko 2-a:

La nigra aŭtomobilo Picolo de maljuna Doktoro Sehnoutka saltetis sur malebena, profunda kampovojo malleviĝanta al vilao inter arbaro kaj malsanaj prunarboj; la Doktoro laŭte kaj persiste bruis per sonavertilo, kies blekado intense penetris en pezan kaj senmovan silenton de varmega posttagmeza horo. Sub eta deklivo li turnis la veturilon preskaŭ surloke /1/ kaj baldaŭ la bremsoj mallonge ekĝemis ĝuste sub la fenestro de domzorganto. La Doktoro, kun akto en la mano, malgrasa kaj rapidmova /2/, hidrangece klaŭna /3/, pasis sur la vojo de pordego al la vilao renkonte al /4/ Ŝimon, kiu celis al li de marcipana dometo. La kuracisto antaŭ momento subite telefonis kaj estis atendata.

RIM.: En pluraj lokoj estas eble uzi aliajn, ankaŭ korektajn esprimojn. El la alvenintaj tradukoj ni ĉerpas nur kelkajn interesajn parolturnojn, kiuj tuŝas la plej tiklajn lokojn: /1/ kvazaŭ sur monero, sur sapo; turbe, karusele. /2/ eksplodema, sangvina, sangoriĉa, kolerika, ekscitiĝema. /3/ pajace hidrargmova, arlekene moviĝema. /4/ kontraŭ, vid-al-vide.

Kategorio II, tasko 4-a:

1. Kiam li komencis lerni, la kurso ĝuste (ĵus) finiĝis. 2. Li eniris ĝuste kiam la patro estis bonveniganta iun ne tre maljunan (nejunan, maljunetan, aĝetan) sinjoron per la vortoj: "Ĝojigas min via vizito!" 3. Knabo haltis kaj observis la ĵus disvolviĝintan lukton (duelon) de ĉiamaj (malnovegaj, pratempaj) rivaloj. 5. Ŝia robo (kostumo, vestaĵo) tre diferencis (dis)de la ĉirkaŭaĵo laŭ (per) la koloro. 6. Mi revenis tute malpura kaj kotmakulita ĝuste en la momento de forveturo.

Kategorio II, tasko 5-a:

1. Mi ekvidis regionon (pejzaĝon) en ĝia plena beleco. 2. Ni ambaŭ (ni ĉiuj, ĉiuj el ni) havas nian opinion, mi la mian, vi la vian. 3. Lia arto atingas la mondan nivelon (skalon). 4. Poste ankaŭ mi naĝos trans riveron. 5. Mi trovis la tradukon ĝusta (korekta).

ANONCETOJ

- Ernesto BOČEK, TŘEŠŤ 456, Ĉeĥoslovakio – deziras koresp. per bildkartoj kun la tuta mondo.
- NOVA ESTONA esp-isto serĉas korespond-amikojn, interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Adreso: Leo TEDER, Parnu tn.34, KILINGI-NOMME, Estonio, USSR.
- MULTAJ JUNAJ esp-istoj (plejparte gestudentoj de universitato kaj Inĝenierakonstruista Altlernejo) dez. kor. kun junaj geesp. el ĉiuj landoj. Skribu amase al la peranto: Docento Viktor GRUŠKO, Socialistiĉeskaja 169, kv. 4., ROSTOV-DON 6, Sovet-Unio (USSR).
- Kun KOLEKTANTOJ de ALUMET-ETIKETOJ dez. kor. kaj interŝanĝi la etiketojn: ARISTARKOV K., LENINGRAD – D 40, Do vostrebovanija., USSR.
- 10-11-JARAJ LERNANTINOJ dez.kor.kaj interŝanĝi p.k. kaj memoraĵojn kun ĉeĥoslovakaj pioniroj. Esperante, ruse aŭ ukraine, skrinu al: Ukraina SSR, Stanislawska obl., Bilszowciwskyj r-n, Nowdkomorochiwska szkola, 5-a klaso, Esperanto.
- 40 GEKNABOJ 12-15-jaraj dez.kor.kun la tuta mondo. Skribu al ilia instruisto: Géza GYURKOVITS, BUDAPEST 4 KER. Upjest, Némethy u 7, Hungario
- LETERVESPERON aranĝos Junulara Esp. grupo en januaro 1960. Adr.: Esp. szakkör, BUDAPEST Ujpest Erzsébet u. iskola, Hungario
- ZAMENHOF JUNULARA ESPERANTO FAKRONDO de Kulturdomo de Sindikatoj, BUDAPEST XI. Féhérvári ut 47, Hungario – dez.kor.kun ĉiuj landoj. La membroj dez.ankaŭ interŝanĝi gazetojn, prospektojn, poŝtmarkojn, glumarkojn ktp. Multaj estas fervoraj foto-film-amatoroj.
- S-ino B. Delgado, 58 Albert Road, Tamworth, Staffordshire, Anglio – dankas al ĉiuj, kiuj skribis je ŝia adreso. Pro granda amaso da ricevitaj let. kaj p.k. ne eblas al ĉiuj tuj respondi. Ŝi petas paciencon, ĉiu letero kaj karto estas respondota.

NI DANKAS AL NIAJ SUBTENANTOJ: N.Jirečková, Lanškroun -- 8, L.Komzáková, Tábor — 3, J. Hajzok, Bratislava. - 3, Dr.L.Kempný, Opava - 3, R.Horák, Ostrava - 5, s.Prachárovi, Zarnovica - 10, R. Bystřický, Fr. Lázně - 18, B.Chroboczek, Horní Suchá - 13, Fr. Veselý, Ostrava IX - 23, R.Tomiczek, Karviná – 6, Ph.Mr.A.Malcová, Strakonice, 3, J.Studený, Vejprty — 13, J.Pařízek, M. Beroun, 13.

HAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHAHA

Iris ĉasisto kun pafilo en arbaron ĉasi aprojn. Subite el densa branĉaro aŭdiĝis: "Ĥroĥ-ĥroĥ, kien vi iras?" La ĉasisto respondis: Mi-mi i-iras - fiŝkapti."

Enamiĝinta junulo proponis al knabino, ke ŝi iru kun li en arbaron ŝiri violojn. Sed en la arbaro ŝiris violojn tiom da junaj paroj, ke restis al ili sole ŝiri violojn.

Kial hodiaŭ Eva konstante dancas kun tiu negro? "Ŝi funebras!"

ENIGMA KURSO.

La solvoj el la 4-a n-ro:

1. maŝino - acide – ŝipo – ido – ne -o.
2. gemoj - ĝemoj
4. JUNULARO

La kurso daŭrigos venonte.

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono, Ĉeĥoslovakio. Aperas laŭbezono.

NOVEMBRO 1959 – n-ro 5.

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR – Esp. odbor.

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (responda)

RED. ADRESO: Fajrero, OSTRAVA 15, Na Lachu 6, ĈSR.

ADMINISTREJO: Vl. Kočvara, OSTRAVA 8, Kamenec 251/3.

ILUSTRIS: Inĝ. ark. M. Kalný

p.k.n-ro T 43090